**La babiladaj rondoj** okazos vendrede,je la **19h30**
La gastiganto preparas mem simplan manĝaĵon (manĝon kaj deserton).
La invitatoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Alfine, ĉiuj donacas monon al la gastiganto por partopreni al liaj elspezoj.
Kiam okazas ĉe Espace Dickens, oni ankoraŭ partoprenas al la lupago.

**"Ambaŭa grupo" ĉe *Espace Dickens***
**la 21-an de oktobro** organizota de Karlota
**la 25-an de novembro** organizota de Francisko

**"Okcidentaj" :**

**la 4-an de novembro**
ĉe Gilbert Darbellay
ch. de l'Orme 6, Morrens
021 732 23 22 / 079 315 14 13

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd

**"Orientaj" :**

**la 11-an de novembro**
ĉe Charlotte Blanc Maillard
av. Nestlé 9, Vevey,
tél. 021 922 34 74

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6


## Laŭzana Esperanto - Societo

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22
+41 76 411 14 55 * +41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
www.facebook.com/societedesperanto.lausanne
Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 - Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


**Laŭzana Esperanto-Societo**

# Informilo

novembro 2016 - n° 09

**Lunde, la 7-an de novembro je la 20-a**
ĉe *Espace Dickens* (Dickens 6), Laŭzano

## Marie-Antoinette,Knud kaj Rosario parolos

pri la Itala Kongreso en Frascati

**Sabate la 17-an de decembro**
*Zamenhofa festo*



**Lunde la 9-an de januaro 2017**
*Francisko parolos pri sia franca turneo*

**Lunde la 6-an de februaro 2017**
*Ĝenerala asembleo*

PIVO - LA FAMA VORTARO



## Impresoj pri la 101-a Universala Kongreso de Esperanto

En Nitra (Slovakio) okazis la 101-an Kongreso de Esperanto, ekde la 23-a ĝis la 30-a de julio. Estis vere bela renkontiĝo inter Esperantistoj. Sabato, sub brilanta suno, la alvenintaj personoj malkovris la kongresejon kaj ricevis la kutiman sakon kun la kongresa libro kaj aliaj formularoj, kiuj helpos ilin en tiuj ankoraŭ nekonataj loko kaj urbo. La kongreso okazis en la Slovaka Agrikultura Universitato. Granda fontano kaj bela parko ravigis nin, ĉar la vetero estis tre varma kaj bela. Vespere okazis la kutima Movada Foiro, kie multe da asocioj prezentis sian laboron. Multe da ĝojkrioj oni aŭdis, ĉar estis mirinde renkonti novajn kaj malnovajn amikojn kaj konatulojn. Oni vidis, ke E-o viglas.

Dimanĉe matene la solena inaŭguro okazis en la Urba Sporta Halo, iom malproksime de la ĉefa kongresejo sed facile atingebla per senpaga buso. La Prezidanto Mark Fettes bonvenigis la 1250 samideanojn, inter ili multe da gravuloj kiel ambasadoroj, ataŝeoj, reprezentantoj de Eŭropa Unio, kiuj esperis, ke en la mondo estu pli da vera homeco kaj solidareco. Ankaŭ la urbestro de Nitra salutis la asembleon. Post paŭza muziko venis la salutoj de ĉiuj landoj. Poste, en la kongresejo ĉiuj kun granda atento legas kaj atentas sian programon. Kion elekti : partopreni kursojn, aŭskulti prelegojn, spekti filmojn, serĉi novajn librojn, aĉeti T-ĉemizojn, aliajn okupaĵojn ? Kiel kutime la programo estas tiel densa, ke ne eblas vidi aŭ partopreni ĉion. Vespere sur la granda urba placo oni ĝuis spekti la nacian vesperon. Popola dancgrupo ravigis nin.

La LKK tre bone organizis ĉion. Por manĝi, en la parko troviĝis tendoj kun vegetarana kaj hinda nutraĵo, eĉ freŝaj preparitaj akvomelonoj kiel deserto. Estis partneraj restoracioj urbe rekoneblaj per la verda flago kaj E-o menuoj. Por trinki, akvo kun etiketo "Esperanto-akvo de vivo" estis havebla ; ne mankis vinoj blanka kaj ruĝa same kun etiketoj UK Nitra 2016. Por ripozi, aermatracoj kaj hamakoj troviĝis sur herbejo sub la arboj. Ankaŭ kursoj okazis ekstere, la vetero estis tiel bela, ke vere ni povis profiti el ĉio. Dank' al la nomŝildo ni uzis busojn senpage tutsemajne kaj por 2 eŭroj taksioj veturigis nin tra la urbo. Mardo estis la tago de la lernado kun multe da famaj gravuloj, inter ili Duncan Charters, Zsofia Korody, Stano Marĉek, Katalin Kovats, Chuck Smith la kreinto de Duolingo en esperanto, sen forgesi nian nacian Mirejon Grosjean. Samtage tagmeze okazis la solena plantado de la Esperanto-arbo sur herbejo antaŭ la aŭlo de la universitato. Ĝis estis etfolia tilio, ĝi estos bela memoraĵo de la kongreso. Merkrede, ekskursoj kondukis multajn partoprenantojn viziti la landon. Dum la tuta semajno okazis senfina kurado al prelegoj, koncertoj, ekspozicioj, teatraĵoj, libroservo. Ateistoj debatis pri islamo, minoritatoj en Slovakio.Oratoraj konkursoj,rezultoj de belartaj konkursoj, aŭkcio, la aŭtora duonhoro, kiel plej efike lerni lingvojn, interreto por komencantoj, tio estas nur parto de la densa programo. Trovi tempon por renkonti amikojn estis preskaŭ malfacile. Por kiu deziras pli fizikajn ekzercadojn, gimnastiko, tajĉiĉuano, ĉendanco el feroaj insuloj, nenio mankis, por ke ĉiu trovu sian plezuron. La esperanta futbalteamo preskaŭ gajnis (4-5) la maĉon kontraŭ la Nitra teamo. Tri golojn por E-a teamo faris Padro Paŭlo Freitas el Brazilio, do ne estas legendo, ke Brazilanoj estas la plej bonaj ludantoj el la mondo... Nur la tempo mankis por esti ĉie kaj ĉiam. Venontjare Seŭlo atendas nin. Koreaj esperantistoj trajnumis dum 23 tagoj inter Seŭlo kaj Berlino. Survoje ili estis varme akceptitaj de lokaj esperantistoj. La filmo pri tio pruvas, ke E-o komplete funkciis sen helpo de vojaĝagentejo. Certe vidante tiun filmon multe da samideanoj deziros partopreni la venontan kongreson.

Vendrede, post la komuna fotado, sekvante la tamburan bandon kun multe da flagoj, dancante, ni atingis la ĉefplacon. Ni laŭte montris al la urbanoj de Nitra, ke Esperanto vivas kaj meritas atenton kaj alportas ĝojon. La internacia muzikfestivalo estis tre bunta kaj kortuŝa, jam estas la lasta vespero en tiu mirinda etoso.

Sabate matene, grava momento en la Urba Sporta Halo, jam okazis la fino. La komitato dankis la volontulojn, kiuj tre bone laboris, por ke la kongreso bone sukcesu. Kortuŝa momento estis la transdono de la flago al la Korea Komitato. En 2018, la UK okazos en Lisboa, Portugalio. La infanoj venis sur scenejon kanti porni. La kongresa ĥoruso montris, ke ili bone lernis kanti dum la semajno. Tutkore kune ni kantis nian himnon.Kvankam ni devas kapabli kanti ĝin parkere, preskaŭ ĉiuj legis ĝin en la kongresa libro. Kun malĝojo kaj valizoj ĉiuj foriris hejmen, kelkaj partoprenos la 49-an ILEI-renkontiĝon en la apuda lando Hungario.

Verda estas nia stelo, al mondpaco la helpanto estas nia bela lingvo Esperanto.

Karlota Blanc Maillard